

N° 196
octobre
novembre
décembre
2021

LA INFORMILO

N° 196
oktobro
novembro
decembro
2021

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2021
Justa komunikado

esperanto
★ estas ★
mojosa!

ESPERANTO

FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



Depuis la libéralisation de l'économie mondiale, la plus grande partie des pays ont réduit les émissions en langues étrangères à destination de l'étranger. Parmi les langues victimes de ces suppressions se trouve la langue internationale et de nombreuses "petites langues".

Certes, de nombreuses associations ont pris le relais et diffusent des émissions en ligne, la plus professionnelle étant la radio polonaise Pola Retradio <https://pola-retradio.org/> dont les émissions sont préparées par d'anciens journalistes de la radio d'état polonaise.

La République Populaire de Chine est passée depuis décembre 2021 des émissions de radio sur internet à la diffusion de vidéos d'information en espéranto. Les jeunes journalistes chinois formés à l'université s'expriment avec enthousiasme et assurent le relais de la politique gouvernementale.

L'émission du 16 décembre 2021 sur (https://tubaro.aperu.net/v/ytb_u1rteHrtG-c/) met en doute la pertinence de la démocratie à l'américaine...

Pourquoi les démocraties occidentales n'utilisent-elles pas encore l'espéranto pour faire connaître leurs valeurs ?????

**Al ĉiuj niaj legantoj ni deziras plej feliĉan novan jaron 2022
kaj sukcesojn en viaj Esperanto-agadoj.**

Biciklado ĉirkaŭ Grésillon dum junio 2021



Unuan fojon, la asocio de esperantistaj biciklantoj BEMI, organizis biciklan semajnon en la Kultur-Domo de Grésillon. Ni estis 9 partoprenantoj, francoj, belgo, nederlandano, germanoj, hispano.

Ĉiun tagon, ni celis viziton kaj Lars Sözüer kreis la itineron tra verdaj vojoj kaj malgrandaj stratoj.

La partoprenantoj aŭ kampadis aŭ dormis en la krom-domo. Ni piknikis tagmeze kaj preparis la vespermanĝojn kaj matenmanĝojn en la kuirejo de la krom-domo. Tiel eblis dume lui la kastelon.

Sunis kaj varmis dum la unuaj tagoj, sed ni tute ne suferis ĉar ni biciklis sur verdaj vojoj sub arboj, perfekte!

Poste pluvis intertempe, sed ni biciklis sur malgrandaj vojoj supre de montetoj kaj la pluvo ĉiam atendis, ke ni haltu sub ŝirmiloj! Plie, ni ĝuis belajn panoramojn.

Esperanta etoso ĝojigis min, ĉiuj scipovis paroli esperante kaj Mathilde, la filino de Xavier bone parolis en Esperanto dum la semajno, ĉar tio ja necesis, por amikiĝi kun Ida, la juna nederlandano, ĉu ne?

La grupo ŝategis la viziton al la kastelo Montgeoffoy, kastelo de la 18-a jarcento, kies aranĝo restis same kiel origine. Krome dum 10 jaroj oni renovigis la ŝtofojn.

Ne nur kasteloj allogis nin, ankaŭ naĝado en apuda lago bonvenis pro la tiama varmego!

BEMI okazigas semajnojn kaj karavanojn, tiel 4 personoj atingis Grésillon bicikle post pluraj tagoj de biciklado....

Kuraĝuloj... la "maljunulinoj" malpli kuraĝis kaj biciklis per elektraj bicikloj, tamen tre oportunaj por sekvi la junulojn!

Post tiu sukceso, BEMI organizis la sekvantan semajnon en Grésillon de la 18-a ĝis 25-a de oktobro 2021, okazis samtempe nia aŭtuna kanto-staĝo



Jannick

Zamenhof-festo en Bazelo

la 27an de novembro 2021

Niaj Zamenhof-festoj okazas alterne en la tri landlimaj landoj: Germanio, Svislando kaj Francio organizataj de la respektivaj grupoj de Frajburgo, de Bazelo kaj de Mulhouse.

En decembro 2020 ne povis okazis la Zamenhof-festo, tiam planita en Bazelo, kaj eĉ kelkfoje prokrastita. Do finfine 2020 estis kvazaŭ "blanka jaro".

Sed jen en novembro 2021 ni ricevis de la Bazela Grupo inviton por la ĉi-jara Zamenhof-festo. Iom escepte ĝi estis planita iom pli frue, jam fine de novembro en la sidejo de la grupo ĉe Riehenring 131, en la kelo de la preĝejo.

En tiu 27a de novembro troviĝis samideanoj el la 3 landlimaj regionoj, iuj venis eĉ el Strasburgo. Entute 17 personoj. Ni estis agrable akceptita en ĉarma salono sub la preĝejo. Pluraj manĝo-tabloj jam pretis por akcepti gastojn al rakledo-manĝo.

Tamen unue esti proponita aperitivo, itala vino, teo, kafo kaj sambuko-suko. Sur alia tablo estis proponitaj iom da libroj de Esperanto-France Est. Favore vendiĝis la libretoj tradukitaj de Edmond Ludwig.



Tagmeze ĉiuj estis invititaj altablĝi por la rakledo. Bona fromaĝo, diversaj aldonitaj garnaĵoj plaĉis al la gastoj.

Post la tagmanĝo Dieter Rooke prelegis pri Hector Hodler, fama svisa esperantisto de la komenco de la 20a jarcento. Li estis la filo de svisa pentristo Ferdinand Hodler. En 2020 estis la centjariĝo de lia forpaso (tiam nur 32-jara). Tia-okaze estis eldonita du-lingva libro (franca kaj Esperanto). La Arkivejo Jura Brüscheiler posedas gravajn arkivaĵojn kaj dokumentojn pri la vivo de Hector Hodler, inkluzive kajeretojn, fotojn, desegnaĵojn ofte ankoraŭ ne konatajn. Dieter menciis lian pacifistan aktivadon kun la ruĝa Kruco okaze de la unua mondmilito.



En la posttagmeza programo estis planita vizito al la kvartalo Erlenmatt. Ni atingis ĝin dum mallonga promenado. Origine tiu loko apartenis al la Germana Fervojo.. La tuta tereno estas nun prizorgata de fondaĵo, kiu celis konstrui apartamentojn por malpli favoraj familioj. Diversaj arkitektoj provis realigis taŭgajn konstruaĵojn laŭ la deziroj de enloĝantoj. Iuj eĉ deziris havi kokinejon en la korto.



Jen la principo de silo-konstruaĵoj

Ni eĉ eksciis, ke iuj apartamentoj ne pli ol 35 kvadrat-metroj ne bezonas hejtadon dank'al dikaj muroj.

Restis tie iu malnova konstruaĵo, tiam uzata kiel silo por plenigi la vagonojn per cerealoj. Nun ĝi iĝis agrabla restoracio kaj hotelo.



Tie ni agrable sidiĝis por trinki kafojn aŭ teojn. Iuj petis, ke Andreo rakontu anekdotojn, kion li volonte faris kaj sukcesis gajigi la etoson.

Krome ni eksciis, ke la grupo de Strasburgo planas organizi la nacian Francan Kongreson en 2023.

Ni kore dankis al la organizantoj por tiu agrabla kaj sukcesa Zamenhof-festo.

Andreo



Ungersheim: Festo de la Transiro

Preskaŭ ĉiu-jare okazas en la vilaĝo Ungersheim Ekologia Foiro, plej ofte en la tria semajnfino de novembro. Evidente en 2020 ĝi ne povis okazi pro la pandemio kaj san-situacio.

Tie nia asocio Mulhouse-Epéranto rezervis tablojn por prezenti al la publiko Esperanton. Plej ofte Roberto sukcesis zorgi pri la rezervado kaj ŝatis tie deĵori kaj ĉefe babili kun la preterpasantoj.

Jen la jaro 2021: Ĉu refoje okazos tiu Ekologio Foiro? Roberto ja plurfoje provis kontakti la urbo-domon en la vilaĝo, por konkrete scii, ĉu tiu foiro konkrete okazos aŭ ne.

Nur komence de novembro ni eksciis, ke ĝi ja okazos, tamen kun la nomo **Festo de la Transiro**.

Kompare kun la antaŭaj jaroj ĝi ja okupis malpli vastan spacon, ankaŭ la publiko iom malabundis.

La budoj kun lokaj bieroj ja havis iom da sukceso.

Tre verŝajne ankaŭ influis la neceso prezenti ateston pri vakcinado aŭ pri sano.

Malgraŭ tiu situacio ni sukcesis disdoni prospektojn kalendaretojn kaj iomete babili kun la homoj. Roberto ankaŭ plenigis la enketilon de Espéranto-France.



Malsamaj situacioj:

Roberto ne estas vakcinita ĉar li deziras senti sin libera (li tamen havis san-ateston)

Andreo estas vakcinita por esti tute libera. (li havas vakcinado-ateston)

E@I: Nova oficejo, nova urbo, nova estonteco

Ĉio, kio komenciĝas, ankaŭ finiĝas. Jes ja, tiu ĉi malnova vero (interalie por budhismo) validas ankaŭ por la oficejo de E@I – kiu ĝis nun, ekde 1a de julio 2011 situis dum precize dek jaroj en la urbeto Partizánske en Slovakio. La organizaĵo havas la sidejon en la urbo jam ekde 2005, sed nur de 2011 ĝi havis sian plene funkciantan oficejon, kie laboris dungitoj, volontuloj kaj staĝantoj.

Nun, post dek jaroj da funkciado en Partizánske venis la tempo por ŝanĝo kaj plia evoluo. Nome, E@I-oficejo kaj la tuta E@I-teamo translokiĝas al alia urbo, en kiu ĝi ekhavas ankaŭ novan oficejon. La urbeto nomiĝas Nová Dubnica (Nova kverkejo), situas je 50 kilometroj for de la ĝisnuna loko, nur 6 km de la distrikta urbo Trenčín, apud la landlimo de Ĉeĥio. La apuda civito Trenčianska Teplá estas grava trajna nodo kaj situas nur je 2 kilometroj de Nová Dubnica – tie haltas ĉiuj rapidtrajnoj, do, ekzemple, al la ĉefurbo Bratislavo oni povas veturi ĉiuhore.

La urbeto estas eĉ pli eta ol Partizánske, sed ĝi havas plurajn plusojn:

- trankvila etoso (la vivo donas impreson de “feria loko”)

- ĉirkaŭa naturo (la urbo estas ĉirkaŭita de arbaroj)

- pieda/bicikla proksimeco de ĉio (facila kaj ekologia vivstilo)

- proksima aŭtoŝoseo (nur 5 km)

- bona trajna konekto (ĉiuhoraj trajnoj, konekto inter Bratislava-Košice)

- apudeco de pli grandaj urboj (6 km en ambaŭ direktoj)

- apudeco de Ĉeĥio (16 km) ktp.

Nova loko — novaj planoj

En la urbo jam situas duetaĝa Esperanto-domo, en kiu nun loĝas parto de la E@I-teamoj (nuntempe kvin homoj, aldoniĝos kelkaj pliaj dum sekvaj semajnoj/monatoj). La nova oficejo situas nur 250 metrojn for de la Esperanto-domo, kaj ĝuste nun ĝi estas rekonstruata, por ke ĝi povu esti somere plene ekipita kaj pretigita por E@I-laboroj. La oficejo estas duoble pli granda ol la ĝisnuna, kiu ebligas kaj gastigon de pli da volontuloj/staĝantoj, sed ankaŭ laboron de pliaj dungitoj. Aldone ja bezonatas spaco por stoki diversan ekipaĵon, kiu estas uzata por organizi diversajn eventojn, sed ankaŭ por stoki eldonaĵojn. Julio estos “translokiga” monato por E@I, dum kiu necesos ĉiun ekipaĵon, meblojn, librojn ktp. transporti de la ĝisnuna loko al la nova.

Kun la nova oficejo kompreneble ankaŭ venas novaj ebloj kaj novaj ideoj por agado. Estonte E@I intencas eĉ pli okupiĝi pri poresperanta agado – proponi pli da servoj al la Esperanto-komunumo, helpi pri diversaj projektoj kaj taskoj, pri kiuj ĝi specialiĝas.

Certe ne mankos ankaŭ peresperantaj projektoj (ideoj jam estas, en nuna tempo oni atendas reagojn pri kelkaj monpetoj, senditaj al EU-instancoj enkadre

de la programo Erasmus+). Kelkaj projektoj certe temas pri ekologio kaj naturprotektado, kelkaj estas prilingvaj.

La unua nova projekto, kiu komenciĝos tre baldaŭ kaj jam ligiĝas kun la nova loko estas “Esperanto-Kvizo”, pretigata por lanĉiĝi la 17an de julio (dum la lanĉo de la Virtuala Kongreso), subtegmentita de UEA. Do jen, la translokiĝo jes ja estas temporaba, komplika kaj malfacila afero – tamen ĝi jam estis bezonata kaj espereble ĝi alportos al E@I plurajn novajn impulsojn kaj al Esperanto-komunumo helpo per sia onta agado, en sia nova loko!

E@I, dum kiu necesos ĉiun ekipaĵon, meblojn, librojn ktp. transporti de la ĝisnuna loko al la nova.

Kun la nova oficejo kompreneble ankaŭ venas novaj ebloj kaj novaj ideoj por agado. Estonte E@I intencas eĉ pli okupiĝi pri poresperanta agado – proponi pli da servoj al la Esperanto-komunumo, helpi pri diversaj projektoj kaj taskoj, pri kiuj ĝi specialiĝas.

Certe ne mankos ankaŭ peresperantaj projektoj (ideoj jam estas, en nuna tempo oni atendas reagojn pri kelkaj monpetoj, senditaj al EU-instancoj enkadre de la programo Erasmus+). Kelkaj projektoj certe temas pri ekologio kaj naturprotektado, kelkaj estas prilingvaj.

La unua nova projekto, kiu komenciĝos tre baldaŭ kaj jam ligiĝas kun la nova loko estas “Esperanto-Kvizo”, pretigata por lanĉiĝi la 17an de julio (dum la lanĉo de la Virtuala Kongreso), subtegmentita de UEA. Do jen, la translokiĝo jes ja estas temporaba, komplika kaj malfacila afero – tamen ĝi jam estis bezonata kaj espereble ĝi alportos al E@I plurajn novajn impulsojn kaj al Esperanto-komunumo helpo per sia onta agado, en sia nova loko!

Peter Baláž
E@I-kunordiganto

Sur la supra foto: Sabata ekskurso al la apuda vilaĝo Trenčianska Teplá kaj ties muzeeto pri trafiko.

Ĉi tiu teksto aperis en la junia (somera) numero de La Ondo de Esperanto (2021).

Ĉe represo aŭ citado bonvolu nepre indiki la fonton:

Papere: La Ondo de Esperanto, 2021, №2 (308).

Rele: La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2021/07/slovakio-32>





Progreso pri rekono en EU – elanas la Eŭropa Komisiono de UEA

Vi ĉiuj certe scias pri la kunlaboro de la Eŭropa Komisiono de UEA kaj EEU por antaŭenpuŝi plurajn proponojn pri Esperanto en la kadro de la reta konferenco pri la estonteco de Eŭropo lanĉita de EU-instancoj. La subteno de unuopaj esperantistoj estis tre granda kaj dankinda kaj nia ĉefa propono estas **la plej subtenata propono inter ĉiuj proponoj pri ĉiuj temoj**.

Sed nun ni eniras en la duan fazon, en kiu parlamentanoj kaj reprezentantoj de la landoj elektos inter le proponoj tiujn, kiujn EU serioze plenumu. Tiucele nun ni bezonas premi sur la partoprenantoj en la elekto de la proponoj, por ke ili favoru la proponojn pri Esperanto..

Danke al la granda laboro de Klaus Leith ni havas la listojn de la partoprenantoj en la diskutoj dividitajn laŭ landoj. Mi estas sendanta ilin kun konsiloj pri la mesaĝoj sendendaj al la prezidantoj de la landaj asocioj en EU-landoj. Se vi volas kunlabori por ke el via lando oni skribu al tiuj reprezentantoj en via nacia lingvo favore al Esperanto, bonvolu kontakti min, renato@esperanto.org.

Retkursoj en Eŭropo kreskas – la itala kazo

La itala kurso havis 65 enskribiĝojn kaj fakte partoprenas inter 55 kaj 60. Ili reklamis per Facebook je kosto de 170 eŭroj. Vidoj ĉe la informa paĝo: 81 000, informpetintoj pri la kurso: 90; aliĝintoj al la kurso: 61, efektive partoprenas: 50. Laŭ aĝo la aliĝintoj estas 6 malpli ol 20-jaraj, 14 inter 29 kaj 30, 16 inter 30 kaj 40, 7 inter 40 kaj 50, 12 inter 50 kaj 60, 6 inter 60 kaj 70, 1 pli ol 70-jara. En pluraj AMO-seminarioj estis esprimita la deziro rejuniĝi la movadon en Eŭropo. Tiucele la eŭropa komisiono de UEA instigis la membrojn en eŭropaj landoj aranĝi retajn kursojn kun movadaj informoj por altiri junajn homojn al la movado. Similajn kursojn oni estas nun organizanta en Danlando, Nederlando, Belgujo, Serbujo. [Renato Corsetti](#)

Kursa superrigardo

Titolo: Kiom da Esperanto-kursoj funkcias nun en la mondo?

Kategorio: Laste ĉe edukado

La kursejo de edukado.net jam de multaj jaroj invitas la kursestrojn registri siajn kursojn kaj tiumaniere raporti pri sia agado, ebligi tutmondan kunlaboron, kolektadon de spertoj kaj materialoj. La informoj pri instruado de Esperanto tre ofte helpas la aktivulojn por konvinki instancojn pri utilo kaj uzo de Esperanto, pri enkonduko de la internacia lingvo en lernejojn. Je kandidatiĝo por subvencioj kaj partopreno en internaciaj projektoj tre helpas nin, kiam ni povas vidigi la statistikaĵojn pri la mond vasta instruado de Esperanto. Tion ni povas fari nur se la gvidantoj de la kursoj registras siajn agadojn. En la nuna artikolo ni vidigas la hodiaŭan situacion, dankas laŭnome la kolegojn, kiuj kunlaboris kaj alvokas vin al registrado de viaj kursoj..

Entute notitaj estas **43 universitataj kursoj el 16 landoj kun 964 kursanoj**.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=860>

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net

Decembra Ondo da Festado

En decembro ni festos ne nur la Tagon de la Esperanta Libro je la naskiĝdato de Zamenhof, sed ankaŭ la jubileojn de niaj samtempuloj Simo Milojević kaj Petâr Todorov, kaj memordatojn ligitajn kun Gaston Waringhien, Lina Gabrielli, Vida Jerman, Dmitrij Perevalov kaj aliaj forpasintaj aktivuloj. Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por decembro 2021, kiun kompilis Aleksander Korĵenkov por la vintra eldono de La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2021/12/decembro-9/>.

Eo-Asocio de Sao-Paŭlo virtualos Zamenhofe

Ĉiujare, en plej diversaj lokoj, en la kvin kontinentoj, la Esperantista komunumo omaĝas al la kreinto de la Internacia Lingvo, Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu naskiĝis je la 15-a de decembro 1859, en Pollando. Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, kun sidejo en la ŝtata ĉefurbo, de pluraj jaroj aliĝas al tiu movado kaj alvokas siajn membrojn al Zamenhofa Festo. Ĉi-jare, ĝi estos ankoraŭ virtuala kaj estas fiksita por la **11-a de decembro**. En la programo: malfermo, festparolado, lanĉo de libroj en Esperanto, interveno de la Esperanto-Junularo de San-Paŭlo, babilado kaj muzikprezento. Pliaj informoj per easp.org.br. Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, fondita en la jaro 1937, sen profitceloj, agadas por diskonigado de Esperanto en ĉi tiu ŝtato. Ĝi publikigas la revuon *La Lampiro*, organizas kursojn, kulturkunsidojn, legoklubon, virtualan kafejon, ŝtatajn kongresojn, eldonadon de libroj kaj funkciadon de biblioteko, kaj estas ankaŭ filio de Brazila Esperanto-Ligo..

Informilo por Interlingvistoj (IPI) en nova vesto

Aperis IPI numero 117 kun tre riĉa enhavo. Ni povas plurporti nur unun eron el tio: 75-a Internacia Kongresa Universitato (IKU-sesio en Montrealo). Mesaĝoj al: [amri \(ĉe\) huji.ac.il](mailto:amri@uea.org). Informoj ĉe: <https://uea.org/gk/983> kaj <https://uea.org/kongresoj/universitato> Kadre de la 107-a UK en Montrealo okazos la 75-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas proponojn pri IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKUsekretario. Amri Wandel ĉe la adreso ĉi-supre) plej laste la 31-an de januaro 2022.

UEA aktiva en UN pere de la NROj

Jen eta raporto pri la unua tago de la Ĝenerala Asembleo de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj), de kies estraro UEA estas membro.

<https://unesperante.wordpress.com/2021/11/30/la-rolo-de-civila-socio/>

Reprezentantoj de UEA kaj TEJO partoprenas la asembleon. Ni danku pro la raporto nian teamon, inter ili al nian honoran prezidanton, H. Tonkin, kiu gvidas nian agadon pri Eksteraj Rilatoj, kaj al Rafael Lima, i.a. agnoskitan de UEA pro sia elstara agado kaj komisiiton de UEA pri la paĝo UNEsperante (oni sekvu ankaŭ ĉe Twitter:

@UNEsperante: <https://twitter.com/unesperante>.

Fernando Maia Jr.

Rimarkinda filmo el DR Kongo

Nia filmo 'Kvazaŭ korpo sen koro' estas spektebla rete. Ĝi estas nia unua, per viaj konsiloj kaj kritikoj ni sukcesos plibonigi niajn laborojn venontfoje. La filmo temas pri la suferoj kiujn travivas la loĝantoj de la orienta Kongo. Ni petas vian kunlaboron en nia kina projekto.

Kvazau korpo sen koro 1: <https://youtu.be/fOgcD8eFXIE>

Kvazau korpo sen koro 2: <https://youtu.be/qv0WUYENO2s>

Joel Muhire, Rutshuru- DR Kongo

Edukado.net survoje al 20!

Titolo: Helpu al edukado.net - naskiĝtaga mesaĝo: En la 15a de decembro estos edukado.net 20-jara. Esti dudekjara por retejo signifas esti maljuna, kun limigitaj kapabloj, esti malfleksa kaj apenaŭ evoluigebla. Edukado.net bezonas esti rekonstruata. Katalin Kovats, la redaktoro, per filmita mesaĝo turnas sin al la membroj por ekscii pri la paĝaro iliajn opiniojn, kiujn oni povas esprimi per mesaĝoj, komentoj en la Gastlibro aŭ plenigante la tiuteman enketilon. La informoj helpas al la redaktoro kaj al ESF, la plej granda sponsoro de edukado.net, en la decidoj pri la estonteco de la porinstruista retejo.

Pliajn detalojn kaj ligilojn al la filmo kaj enketilo vi povas trovi ĉe la paĝo:

<https://edukado.net/novajhoj?id=861>

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net

Recenzo Benczik pri klasika verko

Nicola Ruggiero prezentas pecon el recenzo pri la romano "Kiu semas plorante.." de Oldřich Kníchal kaj Éva Tófalvy. La recenzon faris Vilmos Benczik. <https://youtu.be/z8Ern0dcNN4> La libro estas ankoraŭ akirebla en la Libroservo de UEA. 107 paĝoj. Prezo: € 4,80.

mga

Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr.				Orient-Franca Esperanto-Asocio.	
La Informilo		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO	
Rédaction: Redaktoro:		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
Komitato de la Asocio			Comité de l'Association		
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso		
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr		
Libroservo <i>Service Librairie</i> Sekretario	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net		
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag18@sfr.fr		
Aliaj komitatanoj <i>Assesseurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr		
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelincolnot@orange.fr		
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net		
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr		
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr		
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello54@gmail.com		
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammbach@gmail.com		
Abono al La Informilo →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <i>Abonnement à La Informilo</i>		
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>		
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← <i>Paiement par virement au compte</i>		
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150		BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier		
1. La instituto Chongyang esperas. 2. Biciklado ĉirkaŭ Grezijono 3. Zamenhof-festo en Bazelo 4. Ungersheim: Festo de transiro 5. E@i: Nova oficejo, nova urbo 6. EKO 2021: Esperigaj komunikoj 7. EKO 2021: Esperigaj komunikoj 8. Komitatanoj kaj enhavo-listo 9. Angulo + Bonvolemo 10. Libroj: Sango-ruĝa flago.... 11. MES en Les Issambres 12. Aliĝilo al 73a IFEF-kongreso 13. Aliĝilo al 73a IFEF-kongreso 14. Nia Libro-servo		15. Ebla semajfina renkontiĝo 16. Edmond Privat 17. Edmond Privat 18. Edmond Privat 19. Gazetara Komunikado de UEA 20. Aliĝo kaj temo de UK Montreale 21. Abonoj kaj kotizoj 22. Enigmo + anekdotoj 23. Anekdotoj + Groto de Chavet 24. Originaj nomoj 25. SHAMHAIN + ZF Luksemburgio. 26. Radio Caraibes Nancy 27. Parizo feste ornamita 28. Nia foto-paĝo		ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger	

Estimataj gesamideanoj,**Ĉu Esperanto estas facila aŭ malfacila lingvo?**

Kial tiu demando? La movado ja reklamis de pli ol jarcento pri Esperanto uzante la aserton: Esperanto estas facile lernebla lingvo. Vi ja konsentas kun mi, ĉu?

Sed denove legeblas kaj aŭdiĝas asertoj, ke Esperanto estas same malfacila kiel la etnaj lingvoj.

Mi ne deziras komenci lingvofakan diskuton, sed kiel lingvo-lernanto kaj lingvo-instruisto, kiu instruis dum jardekoj, mi ne hezitas aserti, ke Esperanto estas pli facile lernebla ol etnaj lingvoj. **Punkto, fino!**

Kial legeblas de tempo al tempo, ke Esperanto ne estas facila lingvo? Nu, kiam oni sufiĉe bone regas Esperanton kaj ekkapablas verki iom nuanco-riĉajn tekstojn, konstateblas, ke gramatikaj konoj kaj analiz-kapabloj estas necesaj por atingi gramatike korektan tekston.

Sed se vi esperantumas de kelkaj jaroj, vi certe jam konstatis, ke ege diversas la esprimkapabloj de la parolantoj kaj skribantoj. Ĉu?

Nu, eĉ homoj, kiuj ne vere flue kaj korekte uzas la lingvon, sian pli malpli bonan regadon de Esperanto ili atingis sufiĉe rapide. Dum lernado de etna lingvo ili bezonintus pli da tempo.

Konkludo: ni do nepre daŭre ankaŭ uzu la argumenton de la lernfacileco de Esperanto.

Edmond LUDWIG

**La 5a de decembro estas celebrata la monda tago de la Bonvolemo.
Ĝi estis inciatita de UNO en 1985 en Novjorko.**

En multaj asocioj la membroj same kiel en nia Esperanto-movado ni preskaŭ ĉiuj estas bonvolemuoj. Jen poemo de Laurence Mignot tradukita al Esperanto.

La bonvolemo, ja donaco al si kaj ankaŭ al la aliaj.

Por mi bonvolemo estas sinofero.

*Kelkfoje ellitiĝi kun multaj planitaj aktivaĵoj, kaj enlitiĝi kun la sento neniam fiaski.
Ne atendi la responsulojn, nur bone regi la faraĵojn.*

Doni iom da feliĉo al homoj, kaj eĉ akcepti kritikojn de kelkaj plendemuloj.

Kun la daŭra emo bone fari, por plej bone ilin kontentigi.

*En mondo, kie regas egoismo, ni donu iom da koloroj kvazaŭ prismo.
ke la spektaklo povu daŭri, neniam lacigante nin.*

Nenia bela socio, sen bonvolemo, kiu kelkfoje kreas ligan kun malfavoruloj.

Nenia frateco, nek iom da gajeco sur tiu tero, kie estas tiom da forrabo, malgajeco kaj militoj.

La bonvolemo plenigu niajn urbojn kaj niajn komunumojn, eĉ se tio ne alportas mon-profiton.

Necesas persiste agi, por ke la festoj pludaŭru.

LA SANGO-RUĜA FLAGO (Trevor STEELE) FEL

Ĉu en la lernejo vi lernis ion pri la politika kaj socia vivo sur l'alia flanko de nia globo post la Unua Mondmilito, nome en Aŭstralio? Mi malkovris tion dank'al la ĵus aperinta romano de Trevor STEELE: *La sango-ruĝa flago*.

Batalis pli ol 421 000 aŭstraliaj soldatoj en la armeo de la Brita Imperio (la tiama loĝantaro nombris 4,5 milionojn). Ili eĉ konsistigis la plej altan procentaĵon de viktimoj ene de la imperia armeo. Kaj kiam ili revenis hejmen – multaj estis grave vunditaj – ili ne plu trovis laboron. Kaj aldoniĝis la gripa pandemio!!!

Kio plej ofte okazas tiasituacie? Oni serĉas kulpulojn. Kaj tiuj kulpuloj iĝis diversaj enmigrintoj, ĉefe Rusoj, kiuj fuĝis sian landon pro la caraj persekutoj. Iuj subtenis la bolŝevistojn kaj iĝis la plej kulpaj inter la enmigrintoj. Sed la milicoj de ekssoldatoj ne distingis inter bolŝevistoj kun siaj ruĝaj flagoj, aliaj Rusoj, kaj aliaj deklaritaj malamikoj de la ŝtato. Al la socialisma registaro ili riproĉis la ne-intervenon kontraŭ tiuj “kanajloj”! Kaj baldaŭ ili brulis la domojn de tiuj malpatriotoj!

Cetere ankaŭ tie veras la eldiro de la elzasa verkistino Marie Hart: “La distingituloj kolektas la ŝtonojn, la ordinaruloj ilin ĵetas. La tutan procezon vi sekvos en ĉi ege leginda romano.

Kompreneble ankaŭ filigranas amrakonto, kiu kunportas la leganton ĝis la vivofino en la komunista paradizo! E. L.

Secesio Originala romano de Sten Johansson (Mondial)

En nova originala romano en Esperanto la sveda verkisto Sten Johansson lokis la rakonton en Vienon, la ĉefurbon de la nun eta aŭstria respubliko post la disfalo de la germana kaj aŭstra imperioj. La nova respubliko provis survoji al demokrata ŝtato post la Unua Mondmilito kun siaj milionoj da mortintoj. Socialdemokratoj klopodis en Aŭstrio kiel en Germanio establi demokratan politikon. Espero de libereco blovis en ambaŭ landoj, kio ekŝanĝis la artan kreadon kaj la liberaligon de la moroj.

Tian evoluon Sten Johansson bildigas al ni tra la vivo de gea paro, la aŭstra juda skulptistino Louise kaj la dana ĵurnalistino-reporterino Willi en Vilao Elise. Aldoniĝis baldaŭ la gea bankoficisto Johnny. Willi ricevis la helpon de la socialdemokrata urba prikonstrua oficisto Franz, kiu loĝas en la ĵus konstruita loĝdomaro *Karl-Marx-Hof*. li havigas kontraktojn al Willi kaj. . .

Konante la iom post iom perfortan venkon de faŝismo en Germanio kaj Aŭstrio, ni ja povas imagi, ke la vivo kun kontrolo de la moralpolico ne facilos. . .

Indas noti la historiajn sciojn de Johansson. Oni ankaŭ havas la impreson, ke li tre bone konas Vienon kaj ties ĉirkaŭaĵon, kio vere envolvus la leganton en la rakonton, ĉefe kiam ankaŭ la leganto konas la urbon.

Bedaŭrindaĵo: la rakonto finiĝas iom abrupte eble por tikli la leginton, kiu tie atendas sekvon! Des pli ke ĉiu scias pri la minacanta danĝero! E. L.

 <p style="text-align: center;">Wolfgang Leo Bohr * 19.07.1954 † 08.11.2021</p> <p style="text-align: center;"><i>Kiam vi pensas pri mi, ne estu nur malĝoja. Prefere rakontu pri mi kaj lasu al mi lokon inter vi, kiel mi havis ĝin en la vivo Mi ne estas malproksime, nur ĉe la alia flanko de la vojo</i></p>	<p>Forpasis la 8-an de novembro 2021 en Ahrweiler nia germana samideano Wolfgang Leo Bohr.</p> <p>La estraro de Esperanto-France-Est kondolencas plej sincere al la familio.</p>
<p>In Liebe und Dankbarkeit nehmen wir Abschied von meinem lieben Mann, unserem guten Vater, Schwiegervater und Opa.</p> <p style="text-align: center;">Ilona Bohr Marit und Till mit Veit, Freia und Frida Torben und Marina mit Lea Lara und André</p>	

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2022

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

26an de Februaro– 5an de Marto 2022

Informoj kaj aliĝoj :

- **Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88
- **Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

ALIĜILO AL M.E.S. 2022

MEDITERANEA ESPERANTA SEMAJNO - SAINT-RAPHAËL - FRANCIO

NOMO de la 1a partoprenanto: Naskiĝdato.....

NOMO de la 2a partoprenanto: Naskiĝdato.....

NOMO de la 3a partoprenanto: Naskiĝdato.....

Adreso :

Tel.: Retadreso:



► Mi partoprenos de la 26a de Februaro ĝis la 5a de Marto 2022: jes ne
Sendu al Christine Graissaguel (vidu adreson ĉi-supre)

ĜENERALAJ INFORMOJ

Alveno : De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per taksio.

Akcepto : sabaton la 29an de Februaro - 15:00 **Fermo :** sabaton la 7an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

Kurs-horaroj : 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

Partopreno en kursoj (4-nivelaj) : Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

Nomo/persona nomo	Kursniveleoj	Kursgvidantoj	Niveleoj
	1	Christine GRAISSAGUEL	Vera komencanto
	2		Komenc-parolanto
	3		Progres-parolanto
	4		Diskuto/analizo

Liberaj posttagmezoj por : ban-kuracado en proksima mar-akva banejo (800m), vizitado al Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

Ne forgesu viajn marŝo-ŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.

Distraj vesperoj far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp. Eblas ban-kuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.

ALIĜKOTIZO (ne repagebla) kaj LOĜADO

Plenkreskulo : 60 € Paro : 100 €

(senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : x 420 € = €

Suplemento por unulita ĉambro : x 119 € = €

Popersona suplemento por ĉambro almara : x 87,50 € = €

KURS-NIVELO

Mi partoprenos la kursaron : 1 2 3 4

Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

Trajne (St Raphaël) **Fluge (Nico)** **Memveture**

RESUMPAGO

Aliĝkotizo €

Restado €

Tuta sumo €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël", sendota kun aliĝilo al:

Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)

- aŭ **per bankoĝiro** al :

Société Marseillaise de Crédit

IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980 0020 041

BIC: SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB- 83700 ST RAPHAEL



ALIĜILO al 73a IFEF-kongreso de la 6a ĝis la 11a de majo 2022 en Beroun en Ĉeĥio

Kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) aranĝita de ĈeFEA
Adreso de LKK: Český železničářský esperantský svaz, Bratří Hubálků 161, 560 02 Česká Třebová,
ČR. tel., +420 602483265; kongreso@atlas.cz, <http://kongreso.wz.cz/>
Bank-konto: Raiffeisenbank, a.s., Odborové sdružení železničářů; Kontonumero: 1003019756/5500;
IBAN: CZ18 5500 0000 0010 0301 9756; B.I.C: RZBCCZPP

Varia simbolo: **400490**

Mi aliĝas al 73-a IFEF kongreso, Beroun, Ĉeĥio, 6.5. – 11.5. 2022

S-ro S-ino IFEF-membro Vegetarano Handikapulo

Nomoj kaj adreso kaj lando:

.....
.....
.....

naskiĝjaroTelefono:Retadreso:

Kongreskotizoj		ĝis 31.12.2021	ekde 01.01.2022	sumoj
Kongresano (IFEF-membro)		40 €	60 €	
IFEF-membro loĝanta en B-landoj laŭUEA-difino, familiano kaj junulo/ino				
ĝis 30 jaraĝa		20 €	30 €	
Kongresano (ne IFEF-membro)		60 €	80 €	
Servoj				
Tranoktadkosto minimume por unu nokto laŭ elektita kategorio (plej malfrue ĝis la 31.12. 2021)				
Urbovizito Beroun piede	D1		5 €	
Vizito vitrofabriko Nižbor kun tagmanĝo (buse)	D2		30€	
Faka vizito (Centra regadejo) Praha (trajne)	F		12 €	
Tuttaga ekskurso Křivoklát, Lužná (tagmanĝo)	T		60 €	
Festa vespero (sen vespermanĝo)			0 €	
Ĉambro-perado			0 €	
Postkongreso			280 €	
			Sume	

Ĉambro - mendilo

Mi mendas hotel-ĉambrojn kaj deziras loĝi kun.....

Noktoj (Majo 2022)	6/7	7/8	8/9	9/10	10/11	11/12
				kun matenmanĝo		kun maten- kaj vespermanĝoj
Hotelo Grand	1 lito en 1-lita ĉambro			52 €		67 €
	1 lito en 2-lita ĉambro			32 €		47 €

Mi venos al *Beroun* per la-an de majo je la-a horo.
Loko, dato:..... Subskribo:.....

**Provizora programo de la 73-a IFEF, en *Beroun*,
6.5.- 11.5.2022 kaj postkongreso**

6.5.2022 (vendredo) alveno de gepartoprenantoj 15,00 - kunveno de estraro IFEF/ LKK 16,00 - IFEF estrarkunveno 19,00 - interkona vespero	9.5.2022 (lundo) 8,30 - gazetara konferenco 9,00 - publika plenkunsido 14,30 - terminara komisiono 15,30 - ĉefprelego 20,00 - koncerto	12.5.2022 (ĵaŭdo) - forveturo al postkongreso - promeno en urbo Pardubice
7.5.2022 (sabato) 10,00 - solena malfermo de la kongreso 14,00 - fake aplika komisiono 14,30 - fakaj prelegoj 16,00 - ekumena diservo 20,00 - koncerto	10.5.2022 (mardo) 9,00 - tuttaga ekskurso T 20,00 - nacia vespero	13.5.2022 (vendredo) - vizito al urboj Litomyšl (en UNESCO listo) kaj Svitavy (E-muzeo)
8.5.2022 (dimanĉo) 9,00 - prelego pri urbo Beroun 10,00 - prezento de la 74-a IFK 2022 10,00 - prezento de ĈLA FISAIC 14,00 - ekskurso Beroun D1 20,00 - komuna vespero (bufedo, tombolo)	11.5.2022 (merkredo) 9,00 - ekskurso D2 9,00 - faka ekskurso F 14,00 - movadaj aferoj 16,30 - solena fermo de la kongreso	14.5.2022 (sabato) - vizito de urboj Hradec Králové (muzeo de sekuriga kaj komunika tekniko), Třebechovice (ekspozicio de betlehem-figuraro)
15.5.2022 (dimanĉo) - fino de la postkongreso, forveturo hejmen		

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1. Ĉiu partoprenanto, eĉ familianoj, plenigos legeble apartan aliĝilon por la kongreso kaj por la postkongreso kaj sendos ĝin al la adreso de LKK.
2. La pagon inkluzive bankelspezojn sendu al la indikita bank-konto en eŭroj plej malfrue ĝis la 31-a decembro 2021.
3. Se vi pagos por alia persono (surbaze de aparta aliĝilo), menciu la ĝustajn detalojn pri la aliĝinta persono (nomo, lando, adreso).
4. La aliĝilo estos akceptita per LKK nur post ricevo de la pago. LKK tiam konfirmos la aliĝilon kaj indikos la kongresnumeron kaj ĉiujn -antaŭmenditajn kaj antaŭpagitajn servojn. **La konfirmleteron bonvolu nepre kunporti al la kongreso.**
5. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson. La antaŭpagitaj sumoj por servoj estos repageblaj post la depreno de 10 % por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 31-a de marto 2022.
6. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulos tion.
7. La prezon por tranoktado estas necese pagi por **minimume unu** aŭ ĉiuj menditaj noktoj plej malfrue ĝis 31.12. 2021. Sen ricevo de la pago ne estos certigita la tranoktado. Kaze de malmendo de tranoktado antaŭ la 31.3.2022 estos redonita tranoktpago krome la unua nokto laŭ kondiĉoj de la hotelo.
8. LKK certigas prezon de loĝado kaj nombron da lokoj ĝis la 31.12.2021. Post tiu dato povas okazi ŝanĝoj en la prezo kaj loko por loĝigo.
9. Se vi mendas unu liton en 2-lita aŭ 3-lita ĉambro, nepre indiku kun kiu vi volas loĝi. Alie LKK decidus pri kunloĝanto.
10. Dum registrado ĉe la alveno, post kontrolo de menditaj servoj, la partoprenanto ricevos nomŝildon kun indikita nomo kaj kongresnumero.
11. Parkado ĉe Hotelo Grand – senpaga (se estas libera loko), en garaĝo – 250,- CZK por unu nokto. Pagenda surloke.
12. Deklaro pri protekto de personaj datenoj:
Mi „konsentas“ „ne konsentas“ kun publikigo de mia retadreso en listo de kongresanoj. Forstreku ne deziratan eblecon.



El nia libroservo

Informoj



⇒ Kiel jam kutime, depost du jaroj, mi povas nur doni la daton, kiam eble la libroservo povos esti rekte atingebla.

Temus pri la 1/3aj de aprilo 2022, en Art Sur Meurthe, se tiam la regiona semajnfino komuna al Esperanto-France-Est kaj Bavelo povos okazi.

Informoj aperos en la retejo <http://esperanto.france.est.free.fr>

Ĝis iam!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net




Nove alveninta libro

Les cahiers d'exercices ASSIMIL, Instru-libro. **Henri-Sebastien Erhard**, Assimil., 2021, 128 p. 9,90 €.

La fame konata eldonejo pri lingvo-lerniloj ĵus eldonis novan instru-libron pri Esperanto, kiu do reaperos inter la 79 lingvoj proponataj.

La ekzerco-kajeroj fakte estas vera lernolibro por komencantoj, dividita en 14 ĉapitroj, tra kiuj oni povas pere de 160 ludaj ekzercoj malkovri nian lingvon. Gramatikaj klarigoj akompanas la progreson. Fine de ĉiu ĉapitro plenendas mem-evaluo kolektotaj en fino de la libro por fina evaluado,


Ankaŭ fine troviĝas gramatika resumo kaj solvoj de la ekzercoj !



Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54
- Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:



EBLA REGIONA SEMAJNFINO EN ART SUR MEURTHE 1/3 APRILO 2022

Ĉu okazos aŭ ne okazos la venonta printempa regiona semajnfino en **Art sur Meurthe**? Jen la demando!

En 2020, ĉio estis preta por tiu staĝo programita por la 27/29aj de marto. Ni antaŭvidis ĉiujn detalojn, sed ne la pandemion, kiu devigis la ŝtaton malpermesi ĉiujn aranĝojn kaj vojaĝojn ekde la 15a de marto.

Lastjare ni ankoraŭ esperis la semajnfino ebla, sed nova pandemia ondo denove malpermesis ĝian efektivigon.

Ĉi-jare la venonteco daŭre nebulas. Ni nefirme rezervis datojn en la centro de Art Sur Meurthe:

1/3ajn de aprilo 2022

Sed je la dato de skribado de tiu artikolo (14a de decembro 2021), ankoraŭ ne eblas scii, kiel evoluos la situacio (ŝajne nun ni estas sur la pinto de la 5a pandemia ondo, sed ankoraŭ ne scias kiel efikos la minacanta o-mikrona viruso).

Do ne indas prepari nun programilon.

Tamen, ni konservas la deziron organizi la semajnfino staĝon, se la san-situacio bone evoluas.

Do atentu la datojn: **1/3a de aprilo 2022**, kaj **atentu la informojn** en la retejo de Esperanto France Est:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

kaj en nia dissendo-listoj

Se la staĝo povos okazi, ĝi verŝajne havos jenan programon:

Vendrede fine de posttagmezo: akcepto de unuaj aliĝantoj, post la manĝo, vizito al la urbo aŭ interkona vespero.

Sabate matene: turisma programo (ni esperas, ke ni povos viziti la muzeon pri foto kaj kino en Saint Nicolas de Port).

Sabate posttagmeze: kursoj divers-nivelaj por la komencantoj kaj prelego de Petro Chrdele por la aliaj.

Sabate vespere: bunta distra vespero (1)

Dimanĉe matene: daŭrigo de la kursoj kaj de la prelegoj.

(1) Pri la distra vespero: estas ne oportune inviti konatan esperantistan artiston pro la risko esti devigata nuligi la semajnfino lastmomente.

Tial ni decidis organizi buntan programon **kun la kontribuo de ĉiuj volontuloj**. Komuna kviz-ludo estos interrompita de programeroj, kiuj povos esti skeĉoj, kanzonoj, amuzaj rakontoj, muzikeroj. . .

Nun mi alvokas la legantojn: bonvolu sendi retmesaĝon al: **esperanto-nancy-54@laposte.net** por diri,

- ke vi deziras estis avertita, ĉu la semajnfino en Art/Meurthe la 1/3ajn de aprilo 2022 konfirmiĝas.
- eventuale, ke vi pretus prezenti programeron dum la distra vespero, kaj kiun.

Korajn antaŭdankojn kaj eble ĝis aprilo!

Jean-Luc Thibias

Edmond Privat

Zamenhof a vu juste

On trouve des rues Zamenhof dans une centaine de villes d'Europe ou d'Amérique latine et Genève a même une plaque sur la maison de la rue du Vieux-Collège où logea l'initiateur de l'espéranto en 1906. C'est la vie qui crée une langue et c'est pourquoi le D^r Zamenhof refusait d'être un "créateur" et ne voulait être qu'un "initiateur". Il comptait sur l'usage pour qu'une langue vivante se développe sur la base du petit vocabulaire international qu'il avait publié en 1887 avec quelques règles de grammaire et une liste de suffixes et de préfixes permettant une dérivation régulière. "La vie fera le reste", écrivait-il.

Il a vu juste, car les racines de mots qu'il avait choisis (parce qu'elles sont communes aux principales langues indo-européennes) ont multiplié leurs familles et leurs combinaisons comme dans toutes nos langues, mais sans désordre, au fur et à mesure que l'espéranto s'employait dans des congrès, des réunions, des journaux et des livres. Il ne s'agit pas d'un code artificiel tout fabriqué, mais d'un langage qui s'est développé naturellement par l'usage au cours de milliers de rencontres entre voyageurs ou congressistes de pays différents et sur les lèvres ou sous la plume d'orateurs et d'écrivains s'adressant à des auditoires internationaux.

Il y a bien une Académie espérantiste qui surveille cette évolution normale et officialise les nouveaux mots, mais le meilleur contrôle est le besoin d'être compris, car il impose la discipline et l'unité de prononciation. Ajoutez aux nombreux congrès mondiaux les émissions toujours plus fréquentes à la radio, les journaux espérantistes et les nouveaux livres édités un peu partout. Une académie a plus à enregistrer qu'à régler.

Le génie de Zamenhof fut surtout d'avoir eu cette grande confiance en la vie et cette clairvoyance, aujourd'hui confirmée. En 1887, il avait signé son premier manuel *D^o Esperanto* (celui qui espère). On pourrait l'appeler aujourd'hui: celui qui a prévu.

C'était un oculiste de Varsovie bien connu des pauvres gens pour sa bonté proverbiale. Son père était professeur de langues et, dès l'enfance, le fils en avait appris plusieurs, mais ce qui lui donna l'idée d'un langage international, c'est l'incompréhension qui régnait entre les différentes communautés de sa ville natale de Bialystok, en Lituanie. On y voyait un quartier juif où les gens parlaient yiddish, un quartier catholique polonais, un marché des paysans blancs-ruthènes et des fonctionnaires tsaristes de rite orthodoxe et parlant russe. Langues et religions, mœurs et préjugés divisaient la population. L'ignorance attisait les haines racistes.

J'étais encore écolier en 1906 quand Zamenhof, indigné, nous parlait, au Victoria-Hall à Genève, du pogrom affreux qui avait ensanglanté Bialostock l'hiver

précédent. Il y avait chez lui quelque chose du poète et du prophète. Il souhaitait que l'espéranto répande le sentiment d'unité de la famille humaine et puisse aider à faire tomber les barrières mentales, car "la guerre commence dans l'esprit des gens".

L'UNESCO, qui a proclamé cette vérité, a constaté en 1954 que la diffusion de l'espéranto contribue en effet à réveiller une conscience de l'unité dans la diversité. C'est cela qui a inspiré les poèmes de Zamenhof et de ses premiers amis slaves. C'est cela qui a donné des ailes à la langue elle-même, car aucun idiome humain ne peut vivre sans âme. L'humanité a besoin d'un organe pour exprimer cette âme qui se forme aujourd'hui. Zamenhof l'avait prévu.

A cet homme si modeste, je rendis visite plusieurs fois à Varsovie et, la dernière fois, quelques semaines avant sa mort en 1917. La guerre, les ruines, le massacre et les haines étaient pour lui un douloureux déchirement.

Deux guerres mondiales et trois dictatures détruisirent les organisations et les bibliothèques espérantistes en Europe, mais chaque fois la langue tissa de nouveau sa toile interrompue et reflorissait avec l'idéal qu'elle incarne et qui inspira Zamenhof. Son expérience intrigue les linguistes, son usage intéresse les touristes, mais sa valeur est surtout sensible aux constructeurs du monde à refaire. Ils fêteront cette année le centenaire d'un grand pionnier.

Pensées de Zamenhof

La discorde entre les hommes ne cessera pas avant qu'ils s'accoutument à attribuer au vocable "homme" une plus grande valeur qu'aux vocables "peuple" et "race". En chaque être humain je ne vois qu'un homme avec sa valeur personnelle et ses actes.

Agis envers les autres hommes comme tu désires qu'ils agissent envers toi.

Nous aimons la langue espéranto non seulement parce qu'elle rapproche les corps des hommes et leurs cerveaux, mais surtout parce qu'elle rapproche leurs cœurs.

Dans les rues de ma malheureuse ville natale, des individus, armés de haches et de barres de fer, se jetaient comme des bêtes féroces sur de tranquilles habitants dont la seule faute consistait en ceci: c'est qu'ils parlaient une autre langue que ces sauvages.

L'espéranto est neutre. Il ne connaît pas de nations fortes ou faibles, privilégiées ou inférieures. Personne ne s'humilie, personne ne se gêne. Tous, absolument égaux en droits sur un terrain neutre, nous nous sentons membres d'une seule nation: la famille humaine.

Nous ne croirons jamais que l'espéranto transformera les hommes en anges, car nous savons très bien que les méchants resteront encore méchants. Mais

nous croyons que leurs relations, favorisées par une base linguistique neutre, réduiront le nombre de ces crimes causés non par mauvaise volonté, mais simplement par méconnaissance du prochain ou par contrainte.

Craindre qu'une langue internationale détruise les langues nationales est aussi ridicule qu'accuser la poste de détruire les conversations parlées parce qu'elle permet à des personnes éloignées les unes des autres de correspondre entre elles.

Le mouvement espérantiste, notre idéal, croîtra non en rapidité, mais en certitude. Beaucoup de projets sans but ont brillamment commencé devant le monde, mais sont tombés aussi rapidement. Une cause bonne et certaine progresse ordinairement lentement et avec de grandes difficultés. Ne vous attristez pas! Travaillons et espérons!

Alain Ruchez

Zamenhof, prophète de l'unité humaine

Le Grand Larousse du XX^e siècle nous renseigne: "Zamenhof (Louis-Lazare), médecin et linguiste russe, né à Bialystok (Gouvernement de Grodno) en 1859, mort à Varsovie en 1917. Il fut hanté de bonne heure par l'idée d'une langue internationale. . . □

En cette année 1959, les espérantistes célèbrent donc le centième anniversaire de la naissance du père de l'espéranto, et c'est en l'honneur de Zamenhof que le prochain Congrès mondial de l'espéranto se réunira au début d'août à Varsovie.

Nombreux sont les projets de langue internationale qui ont vu le jour depuis le siècle dernier. Si celui de Zamenhof a connu un succès sans précédent, s'il est entré dans la pratique, s'il a donné naissance à une langue auxiliaire vivante, écrite et parlée dans le monde entier (par un nombre de personnes qui varie beaucoup, il est vrai, d'un pays à l'autre), c'est que le "docteur Espéranto" était plus qu'un linguiste "hanté par l'idée d'une langue internationale". Cet homme, à l'exemple des prophètes de l'Ancien Testament, avait une claire vision de l'unité humaine; son désir était de contribuer à une meilleure compréhension entre hommes de différentes nationalités; sa langue auxiliaire était un moyen, non un but. Et à cette langue il a su donner une âme.

Un moyen, et non un but: le but, pour Zamenhof, c'était de supprimer les barrières qui séparent les peuples et qui permettent à leurs chefs de les lancer l'un contre l'autre comme des meutes de loups enragés.

Le moyen est-il bon? Le but peut-il être atteint? A la première question la pratique de l'espéranto répond affirmativement. Langue auxiliaire neutre, qui ne prétend nullement remplacer les langues nationales, l'espéranto est un bon moyen de faciliter les relations entre gens de différents pays, de promouvoir la compréhension et l'amitié internationales, de tendre vers l'unité dans la diversité.

Il est plus difficile de répondre à la deuxième question. Les hommes parviendront-ils un jour à supprimer les murailles du nationalisme?

*Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj
Per la sankta amo disbatitaj*

*Les murailles millénaires tiennent bon
Entre les peuples divisés;
Mais ces barrières obstinées s'écrouleront
Abattues par le saint amour.*

Voilà ce que proclame Zamenhof dans un hymne intitulé *l'Espoir*, qui est devenu l'hymne officiel du mouvement espérantiste.

C'est le rêve que faisait déjà le prophète Isaïe. "Le temps est venu (annonce-t-il) de rassembler toutes les nations et toutes les langues". Cette prophétie se réalisera-t-elle? Malgré l'existence des Nations Unies, cela reste encore aujourd'hui une question de foi.

Seulement, que sa réalisation soit proche ou lointaine, la vision de l'universelle fraternité est indispensable au progrès de l'humanité. Elle est l'étoile qui oriente nos pas. Qu'elle vienne à disparaître et l'humanité sombrera dans la barbarie. Zamenhof a créé l'espéranto parce qu'il possédait cette vision. Son œuvre n'est pas seulement marquée par le génie d'un linguiste étonnamment doué, elle est en plus portée par un grand souffle prophétique.

Charles Baudouin

L'espéranto vit

J'ai été un des privilégiés qui ont reçu dès l'école l'enseignement de l'espéranto. En un temps où l'on n'y songeait guère encore dans les cercles officiels, un de nos maîtres d'allemand, personnalité à tous égards remarquable et rayonnante, nous avait organisé au lycée de Nancy un petit cours facultatif qui enthousiasma, à treize ans, un bon petit nombre d'entre nous. Cela reste un des beaux souvenirs de ma vie d'écolier. Et cela m'a laissé partisan résolu d'un tel enseignement. Car si je n'avais pas vécu cette expérience, je m'en rends compte, j'eusse nourri plus tard à l'endroit de la langue internationale les préjugés que je vois courir les rues. Je les comprends d'autant mieux que je suis hérissé par tout ce qui sent la rationalisation, la taylorisation, la mécanisation, l'uniformisation de la vie, par la manie des initiales non moins que par celle des néologismes barbares empruntés au jargon du hall de gare ou du hall d'hôtel. J'aurais sans doute, moi aussi, comme tant d'autres, pensé *a priori* que l'espéranto s'apparentait à cette moderne prolifération de monstres hideux, et je l'eusse moi aussi rejeté sans autre examen. Ceux qui connaissent mes goûts savent bien que, si j'ai gardé celui

de l'espéranto, c'est que cette langue est précisément tout autre chose. . .

L'espéranto vit. Et c'est bien l'argument décisif contre ceux qui sont encore à en démontrer l'impossibilité. Il démontre, lui, le mouvement en marchant. Grâce à cette langue, j'ai voyagé fort agréablement en Hongrie; grâce à elle, j'ai connu les seuls congrès internationaux qui ne m'aient pas irrité. . .

Bien qu'il possède une littérature originale qui est loin d'être sans intérêt, l'espéranto est d'abord et ambitionne surtout d'être un intermédiaire et un truchement. Il excelle dans la traduction. Par ses souples possibilités d'épouser le génie des langues diverses, il permet des transpositions particulièrement fidèles. Comme on a montré qu'il peut favoriser l'étude des langues nationales étrangères (en isolant une sorte de grammaire absolue), il peut aussi aider à la traduction d'une de ces langues dans une autre.

Quand j'ai réalisé ma traduction française de l'*Iphigénie* de Goethe, je n'ai pas vergogne d'avouer que la traduction de cette œuvre en espéranto par Zamenhof a été un de mes meilleurs instruments de travail.

Pierre Bovet

L'espéranto à l'école

Il s'est constitué l'année dernière une Société des éducateurs espérantistes de Suisse. Elle fait du très bon travail. Après avoir mis au point un programme d'enseignement de l'espéranto pour les élèves primaires de langue française, elle a lancé un manuel rédigé en espéranto, qui raconte l'histoire d'une famille de souris; le vocabulaire en est expliqué au fur et à mesure par des dessins. La société suisse est naturellement en relation avec la société internationale. Elle favorise une correspondance internationale mise sur pied par un instituteur de Bienne, M. Marcel Erbetta. Trois fois par an paraissent des cahiers polycopiés groupant chacun des contributions d'une quinzaine de classes d'écoliers de divers pays en deçà et au-delà du "rideau de fer". Deux fois par an, des rencontres permettent des contacts personnels avec tout ce qu'ils entraînent d'enrichissement pédagogique. Le président de la société est M. Claude Gacond, instituteur à La Sagne.

Partout où l'on s'est enquis des résultats indirects des leçons d'espéranto □ et déjà dans la conférence internationale convoquée à Genève sous les auspices de la S. D. N. en avril 1922 □ on en a constaté les avantages sur deux plans différents. Sur le plan logique, pour l'enseignement de la langue maternelle comme pour celui des langues mortes ou étrangères, l'espéranto, qui fait constamment appel à l'activité de l'élève, stimule considérablement son intérêt pour la langue, le vocabulaire, la grammaire, l'analyse de la phrase, les familles de mots. Sur le plan moral, la documentation qu'apporte la correspondance interscolaire enrichit les leçons de choses, stimule et concrétise l'intérêt amical pour les petits camarades de pays lointains. Les résultats sont évidents. On ne peut que souhaiter, dans l'intérêt général de l'école, de voir se généraliser la pratique de l'enseignement de l'espéranto. Pour les adultes, comme pour les écoles de commerce, point n'est besoin d'insister: valeur pratique, valeur humaine sautent aux yeux. Mais il vaut la peine de signaler le profit qu'une école qui aspire à être active, vivante, éducative, tire de la langue de Zamenhof.

Près de 600 maires proposent l'espéranto

A une enquête organisée par un comité spécial sur l'initiative de Franz Stein, maire de Mayence, 669 maires de douze pays d'Europe (Allemagne, Angleterre, Autriche, Belgique, Danemark, France, Grèce, Italie, Luxembourg, Hollande, Norvège et Suisse) ont répondu et 581 déclarent que l'espéranto peut apporter une heureuse solution au problèmes des langues, grâce au fait qu'il est facile à apprendre et que sa neutralité évite d'offenser les sentiments nationaux.

Le Comité international des maires a été chargé d'entreprendre les démarches nécessaires en vue d'une généralisation de l'emploi de l'espéranto dans les relations internationales, de manière à protéger les rôles des nations dont la langue n'est pas très répandue.

Tous les maires de Norvège et de Grèce qui ont participé à l'enquête se sont déclarés en faveur de l'espéranto. La proportion des réponses affirmatives venues d'Angleterre et d'Italie était respectivement de 92 et de 99%.

Mai 1959

Mikaelo Bronŝtejn ricevis la unuan Laŭron de la Akademio

Libera folio informas:

Dum multaj jaroj mankis en Esperantujo prestiĝa literatura premio, donata al jam publikigita verko. Ĉi-jare unuafoje estis aljuĝita la Laŭro de la Akademio, kiun povas ricevi verko aperinta dum la lastaj kvin jaroj. La premion ricevis Mikaelo Bronŝtejn por sia historia romano "Mi stelojn jungis al revado".

Espéranto France-Est plej kore gratulas al bone konata gast-preleganto en nia federacio.



Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 1001 (2021-12-14)

Ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro (KER) eniras novan fazon

Ekde 2008, pere de sia Komisiono pri Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro (KER), konsistigita de Katalin Kováts (gvidanto), Zsófia Kóródy kaj Renato Corsetti, UEA funkciigas la unulingvan KER-ekzamen-sistemon pri Esperanto por la niveloj B1, B2 kaj C1. La sistemo estis konstruita laŭ la kriterioj de la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo (ALTE), ĉe kiu Zsófia Kóródy estas reprezentanto de UEA. Ĝi funkcias kunlabore kun "Edukado.net" kaj estis validigita de la ŝtata ekzamen-centro ITK (nuntempe ORIGO) de la Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto (Hungario). Ekde la funkciigo de la sistemo UEA kontrakte kunlaboris kun ORIGO por la okazigo de la ekzamenoj kaj en tiu 12-jara periodo sukcese ekzameniĝis 2463 personoj el 76 landoj.

Komence de 2021 UEA pere de sia komisiono eklaboris por enkonduki du novajn erojn en la ekzamen-sistemon: aldoni la plej altan nivelon (**C2**) kaj ebligi al kandidatoj **trapasi plene rete la ekzamenojn**. Pro internaj aferoj ORIGO komunikis al UEA nekapablon tion disponigi en baldaŭa periodo kaj de tio la partioj interkonsentis fini la kunlaborkontrakton, lasante al UEA la rajtojn pri la validigita ekzamen-sistemo. Tiel, por plenumi la atendojn pri la novaj eroj, teamo formiĝis kadre de Edukado.net por ellabori la postularon kaj la modelajn test-seriojn de la nova nivelo. La membroj de tiu teamo estas tiuj, kiuj dekomence ellaboris kaj funkciigis la unu-lingvajn Esperanto-ekzamenojn ĉe la budapeŝta ekzamen-centro, nome Katalin Kováts, Pálma Csiszár, Márta Kovács kaj Zsófia Kóródy, ĉiuj diplomitoj de la Esperantologia Fakulo ELTE en Budapeŝto kaj mem ekzamenistoj kaj test-verkantoj de ORIGO. Tiu teamo dum la jaro ellaboris la novan nivelon C2, pri kio okazis prezento dum la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Aldone ili ankaŭ desegnis kaj kreis helpe de ekstera programisto Anthony Bodineau la teknikajn eblojn por okazigi plene rete la ekzamenojn.

Por doni ankaŭ novan organizan strukturon al la ekzamen-sistemo UEA komencis trakti kun la Akademio de Esperanto (AdE) pri kunlaboro por agnosko kaj funkciigo de la ekzamenoj, laŭ kiu AdE povos kontroli la sistemon kaj validigi la ekzamenojn por la nivelo C2. UEA rekonas inter la akademianoj elstarajn fakulojn, kiuj profesie okupiĝas pri lingvo kaj ekzamenado ĉe internacie renomaj universitatoj, kaj taksas, ke la akcepto de AdE por tiu kunlaboro donos ne nur pli grandan prestiĝon, sed ankaŭ internaciecon kaj garantion pri la valideco de la C2-ekzamenoj. Aldone tiu kunlaboro juste reliefigos la rolon de AdE en

la historio de la KER-ekzamenoj de UEA, por kiuj efektive jam pluraj akademianoj estis rektaj kunlaborantoj.

Por sekurigi la validecon de la plene reta ekzameniĝo UEA estas en kontraktprocezo kun la firmao ProctorExam, kun sidejo en Nederlando. La firmao kunlaboras kun diversaj universitatoj kaj institucioj, i.a. kun la Universitato de Leiden, por reta ekzamenado, ĉefe pri lingvoj, kaj la kunlaboro sekvas ĉiujn teknikajn kaj leĝajn postulojn.

Retrorigarde, la paŭzo de la ekzamenoj pro la pandemio utilis por firmigi la novajn erojn kaj la jaro 2021 funkciis kiel transirperiodo por tiu nova fazo. Laŭplane la procedoj por la agnosko fare de la Akademio finiĝos dum la jaro 2022, kiu markos la rekomendon de la ekzamenoj. Unuaj provoj de la reta ekzamenado okazos por la nivelo C2, jam en decembro 2021 kaj januaro 2022, por fermita grupo el interesatoj, kiuj sin anoncis dum 2021 per enketo entreprenita de la KER-ekzamena Komisiono de UEA kaj Edukado.net.

UEA daŭre kunlaboros kun Edukado.net, kies redaktoro, Katalin Kováts, restas taskita pri la organizado de la ekzamen-sesioj kaj kunordigo de la laboro inter la kunagontaj partneroj. La retejo de Edukado.net restos la loko, kie interesatoj trovos la necesajn informojn kaj povos aliĝi al la ekzamenoj. La nova fazo daŭre kalkulos je la ĉeestaj ekzamenoj en Universalaj Kongresoj kaj aliaj grandaj eventoj kaj konservos la tradicion de la Tutmonda Ekzamen-tago, ebligante paralelajn ekzameniĝojn samtage en pluraj lokoj en ĉiuj mondopartoj.

La novaj ŝanĝoj povos rezultigi reduktion de la ekzamenkotizoj, kreskigante la inkluzivecon de la sistemo, aldone al tio, ke la reta ekzamenado postulos nek vojaĝojn nek presadon. Tiu aspekto kontribuas ankaŭ al la reduktado de paperuzo kaj energiuo por transporto, se oni preferas ekzameniĝi dehejme. Dum la unuaj testoj kaj okazigo de la reta ekzamenado UEA same atentos pri eventualaj malfacilaĵoj por homoj en landoj kun limigita retkonekto kaj pri kiel agadi por venki tiujn barojn. UEA estas aparte danka al sia KER-Ekzamena Komisionoj kaj al Edukado.net kaj kunlaborantoj, sen kies laboro kaj kunlaborigoj ne estus eble venigi al la Esperanto-movado tiujn novajn atingojn.

Sekreta taglibro Julian Modest (Libera eldonejo)

La bulgar-devena aŭtoro Julian Modest rakontas komence de sia romaneto la vivon de bulgara junulo deziranta studi fizikon en la bulgara komunista ŝtato. Li devenas de eta vilaĝo kaj tie vivas sian junularan vivon de liceano, de enamiĝinto, resume: de normala serioza junulo. Tiu "normala" vivo fakte ŝajne ne vere rakontindas, kaj mi aldonu: eĉ iom tedas la leganton. Sed kiam li iĝas studento pri fiziko, li renkontas politike aktivajn kunstudentojn tiel, ke lia nova vivo kontrastas kun la antaŭa: kiam en 1956 la hungaraj gestudentoj ekribelas kontraŭ la soveta reĝimo, lia vivo iĝas eĉ danĝera, ĉar li sin engaĝas, li multobligas kaj disdonas kontraŭ-komunistajn flugfoliojn kaj eĉ verkas ribelan poemon. Jam la ŝtata polico lin postkuras, sed dank'al geamikoj li sukcesas eskapi al la pli libera Jugoslavio kaj poste ... Ni diru nur, ke la vorto "sekreta" ligiĝas al lia posta vivo en libera lando. Indas sekvi liajn spertojn kiel el- kaj en-migrinto.

Andrea B. (Pleudaniel)

Aliĝilo kaj temo de la 107a UK en Montrealo

Malfermiĝis la aliĝilo de la 107a Universala Kongreso de Esperanto (UK), kiu okazos en Montrealo, de la 6a ĝis la 13a de aŭgusto 2022. Frue aliĝu por ĝui la plej bonajn aliĝkotizojn: uea.org/kongresoj/.

La kongresa temo estas: “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj”. La temon proponis la Loka Kongresa Komitato (LKK) de Montrealo kunlabore kun la eks-prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la Estraro de UEA. La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj estis deklarita de UN kaj Unesko fine de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kiu ludis gravan rolon en la agado de UEA kaj en la pritrakto de la kongresa temo de la 104a UK, “Vivanta naturo, floranta kulturo” en 2019. Nun la 107a UK estos unu el la internaciaj aranĝoj, kiuj helpas lanĉi la Jardekon por la periodo 2022-2032.

La atento al indiĝenaj lingvoj nekontesteble praviĝas, ĉar ili entenas grandan parton de la lingva kaj kultura diverseco de la homaro kaj estas la portantoj de valoroj kaj praktikaj konoj, kiuj montras kiel homaj socioj povas kunvivi harmonie kun la naturo. Kaj malpli pozitive: ĉar ili grandparte estas minacataj de malapero. Pri tio la LKK preparis specialan gazetaran komunikon en la angla kaj en la franca por diskonigi en Kanado, i.a. okaze de la 26a de julio.

Esperantistoj jam delonge montris sin konsciaj kaj engaĝitaj pri lingvaj rajtoj kaj scivolemaj pri la apartaĵoj de malpli konataj lingvoj – do la du unuaj vortoj de la temo invitas nin al konatiĝo kun la fascina panoramo de indiĝenaj lingvoj kaj kun la streboj por ilin vivteni kaj revigligi. La tria vorto, “tero”, atentigas nin pri la bataloj de indiĝenaj popoloj por la rajto mastrumi siajn proprajn teritoriojn, sed ankaŭ memorigas, ke tia indiĝena mastrumado estas efika strategio por konservi arbarojn kaj aliajn ekosistemojn. Tiamaniere la temo ankaŭ ligiĝas al la diversaj engaĝiĝoj de UEA kaj la Esperantomovado, subtene al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) de Unuiĝintaj Nacioj. La graveco de lingva diverseco por la realigo de la Celoj certe troviĝos inter la ĉefaj diskuttemoj en Montrealo.

La prezidanto de UEA, Duncan Charters, komentis pri la temo: “La tero estas la kunteksto de la kiel eble plej diversa koncepto de vivo. La sankteco de niaj rilatoj kun la komune posedata kaj posedanta tero estas aparte rimarkebla en indiĝenaj kulturoj. Kaj la lingvoj estas la plej alta kaj plej diversa esprimiĝo, kiu en diverseco povas ĉiujn unuigi”.

Ne maltrafu dum la 2a Virtuala Kongreso partopreni la montrealajn programerojn (vk.retevent.com/programo?s=Montrealo) kaj la babil-rondon pri indiĝenaj lingvoj kun Mark Fettes (vk.retevent.com/programo?s=Kanado). Aliĝi al la VK eblas per vk.esperanto.net.

Fonto: Gazetara Komunikado de UEA, 2021, №966.



ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2022 ĝis 2024

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2021 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2021.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2021, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2022	2023	2024
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA 2022	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere			74 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2022 por 1208				
	2. Per franca bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2022, 2023				
	3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

Kvar paŝoj al plena ĝojo – por vi kaj aliaj!



Donacu 10 eŭrojn aŭ pli al la **Asocio Nova Familio** pere de Betti Maul:

- **Betti Maul**

IBAN: **DE 04 4306 0967 8215 8214 00**

BIC: GENODEM1GLS

kun rimarko „georfoj - kuketoj“

- **Sendu** retmesaĝon al EU-kampanjo@gmx.eu

kun via fizika poŝtadreso (en EU-lando*)
 kaj indiku, kiam vi kiom pagis al la konto de Betti

- **Ricevu** du Ludovikuketojn (post ĉirkaŭ 10 tagoj)

... aŭ pli ol du, se vi eĉ pli grandanime donacis



- **Ĝuu!**

Nia kasisto pretas peradi vian donacon.

Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2								■		
3		■								■
4				■				■		
5						■				
6					■					■
7				■			■			
8								■		
9			■						■	
10		■								

Gangstero sukcesis eskapi post priŝtelado de luksa juvel-butiko. Li donacas belegan kolieron el oro kaj diamantoj al sia amorantino. Ŝi vikle brakumas la viron, ekkriante:

“Ho, koran dankon, karulo, vere pli ol belega! Ĝi tre verŝajne valoras pli ol kvar aŭ eĉ ses jarojn! Mi daŭre pensos pri vi, dum via foresto!”

Juĝisto admonas ŝteliston, kiu jam sesan fojon aperas en la tribunalo.

“Refoje vi? Vere, ŝajne via memoro-kapablo difektiĝas! Last-foje mi ja laŭte admonis vin, ke mi ne plu volos vidi vin!

- Prave, sinjoro juĝisto... Tion mi ja deziris klarigi al la polcistoj, sed ili ne komprenis min!”

Vespere la patro demandas siajn gefilojn:

“- Kion vi faris hodiaŭ por helpi en la hejmaj taskoj?

- Mi sekigis la glasojn!

- Mi poste kolektis ĉiujn pecetojn kaj balais la splitaĵojn!”

“- Soldato Marko!

- Jes, serĝento?

- Mi ne vidis vin ĉi-matene dum la ekzercado pri kamuflado!

- Jes, serĝento, dankon, ke vi agnoskas mian bonan kamufladon!”

La edzo diligente pedalas jam de 50 minutoj sur sia hejma biciklo.

La edzino alproksimiĝas kaj petas lin:

“Karulo, mi ŝatus ekkui kokidaĵon... proksimume post kiom da kilometroj vi planas atingi la domon?”

HORIZONTALE

1. Kuraceĵ.
2. Cerb'. Koro de roboto.
3. Ripet' de komputa procedo.
4. Blufloga plant'. Moskit' transportante malarion. Pronomo.
5. Radioaktiva element'. Maljuna.
6. Grup' de silik-mineraloj. Fekul'.
7. Marbird'. Regno-kodo de Makedonio. Fandad' de objektoj el metalo.
8. Komika artist'. Regno-kodo de Butano.
9. Prefikso. INVERSE: horizonta tabulo.
10. Karesema ag' pri bebo.

VERTIKALE

1. Kemia eksplod'.
2. Sufikso. Religio.
3. Brilu pri fluoreska materialo.
4. Demand'. Korinklin'. Bestparko.
5. Forta impres'. Episkopa kap'.
6. INV:malproksima planed'. Subtrak'.
7. Kurs' por skiantoj. Pli ol necese.
8. Deviga regul'. Bati sen vokaloj.
9. INV:paperfoliar' kun desegnaĵoj.
10. Amatino de Zeŭso. Nedifina pronomo. Eksplor'.

Okaze de ordigado de paperaĵoj, Alberto kaj lia edzino ektrovas malnovan kuponon de ŝu-riparisto, ricevita antaŭ naŭ jaro!

Surprizite, ili pro scivolemo vizitas la butikon de la ŝu-riparisto, ĉar ili ja ne plu memoras, kies ŝuoj estis tie tiam lasitaj.

La metiisto trarigardas la kuponon, iris al malantaŭa ĉambro kaj revenante tenis en la manoj du ŝuojn de virino kun rompitaĵoj kalkanumoj...

“Mi petas komprenemon, mi lastatempe estis iom superŝutita je laboro, revenu vendredon, ili tiam estos pretaj.”

Helena estas tre juna lernantino, ŝi kaptas la telefonilon kaj alvokas la lernejon:

“Bonan tagon, sinjoro direktoro, mi estas la patrino de Helena. Ŝi estas malsana kaj ne povos viziti la lernejon hodiaŭ.

- La direktoro skeptike miras pri tio, ĉu vere vi estas la patrino de Helena?

- Memevidente, sinjoro direktoro, mi ja estas mia patrino!”

SOLVO de KVE 195:

Horizontale: 1-ARKEOLOGI. 2-RUIN. ANAS. 3-KLISISIM. 4.MALT. TA. 5-TK. LI. PRI. 6-EROT. VIOL. 7-KAPILAR. 8-TNAG. LORN. 9-OKSID. LRO.

Vertikale: ARKITEKTO. 2-RUL. KRANK. 3-KIAM. OPAS. 4-ENSALTIGI. 5-ILI. 6-LAKT. VAL. 7-ONI. PIROL. 8.GASTRO. RR. 9-ISMAILANO.

En psikiatra hospitalo, vizitanto esploras pri la uzataj kriterioj, laŭ kiuj malsanulo nepre iĝas paciento de la hospitalo.

"Estas tre simple! Ni plenigas bankuvon je akvo kaj proponas al la malsanulo kuleron, tason kaj sitelon. Ni petas lin malplenigi la kuvon.

– Mi komprenas, konfirmas la vizitanto, normala persono ja elektos la sitelon, ĉar ĝi esta pli granda!

– Ne, kontraŭas la kuracisto, normala persono forigos la tru-ŝtopilon por elfluigi la akvon! Ĉu vi deziras ĉambron kun balkono?"

En la lernejo iu knabo svivolemas pri sia kamarado.

"Mirige, ke vi memoras tiom da nedecaj vortoj?"

– Facile! Mi registras per mia poŝtelefono, kiam mia patro planas ion ripari en la domo!"



En Ardèche, la groto "Chauvet"

Mi ŝatus paroli pri prahistoria groto, kiun mi vizitis antaŭ du jaroj en Ardèche, la groto "Chauvet" malkovrita en 1994 de tri speleologoj, Jean-Marie Chauvet, Eliette Brunel kaj Christian Hillaire, nomitaj "malkovristoj".

Tiu groto, klasigita en la "Monda Heredaĵo de Unesko", revoluciis la tutan teorion pri la naskiĝo kaj evoluo de la arto. Ĝi estis fermita nature antaŭ 20 000 jaroj pro falo de ĝia enirejo.

Tial povis konserviĝi sendifektaj spuroj de ĝia formacio, de la bestoj kaj homoj, kiuj vizitis ĝin.

La pentraĵoj estas mirindaj, ofte bildigante movojn, kun ripetado de temoj. Ili estis pentritaj per lumo de grasolampo.

Kvin cent mamutoj, felisoj, ĉevaloj, bizonoj, boacoj, uroj, unu pantero kaj unu otuso, ktp, kovras la murojn kaj ankaŭ troviĝas desegno de vulkana erupcio de vulkano de "Vivarais", antaŭ 36 000 jaroj.

Sed fakte oni vizitas ekzaktan kopion. Lumo, temperaturo, odoro de ŝtonoj, paŝo-signo, kaj pentraĵoj, ĉio estas same refarita. La originala loko estis radiografita tridimensie, reproduktita je milimetro betone kaj finita per mano. Artistoj kaj prahistoriistoj, refaris pentraĵojn per lignokarbo de ordinara pino samkiel la Aŭrignacioj.

Malgraŭ datado per karbono 14 je -36 000 jaroj, serĉistoj malkonsentas pri la aĝo de la pentraĵoj, ĉar ili estas pli progresintaj ol en la Groto de Lascaux, kiu datiĝas de -17 000 jaroj.


Je kelkaj kilometroj for situas la vera groto, fermita al la publiko kaj sub alta kontrolado. Serĉistoj daŭre kontrolas la kvaliton de la aero, la temperaturon de la tero, ktp... Ili moviĝas sur pontetoj.

Ĝi estas protektiita kvazaŭ trezoro!

Tiel dekoj da grotoj konservas spurojn de la prahistoriaj homoj. Multaj estas viziteblaj fare de la publiko: 28 en Francio. Sed multaj suferis pro detruantaj priserĉadoj, sed ĉiuj vidigas al ni tiun sur-rokan arton, kies klarigo estus la sankta karaktero de la loko.

En Francio, estas multe da grotoj en Akvitanio kaj Pireneoj.

A visiter: lafrancevuedesgrottes.fr



Originalaj nomoj en Esperanto

Nuntempe Esperanto estas moda por nomi novaĵojn, sed uzitaj de neesperantistoj ofte la vortoj estas malveraj aŭ almenaŭ neprecizaj.

Mi malkovris, ke tradicia panfaristo, kiu loĝas en Carentoir (56) kaj vendas siajn panojn kaj kukojn en mezepokaj festoj, nomas “kuko” sian brioĉon kun sekaj vinberoj. Fakte li ne konas Esperanton sed trovis tiun vorton bela kaj adoptis ĝin. Li povus nomi ĝin pli bone “brioĉo” sed la “ĉ” estas por li stranga litero, do li preferis “kuko”.

Eble vi legis tion: En speciala magazino Ouest- France pri “la maro nia futuro” p15, oni ĝuste verkis pri ekspedicio “Unu Mondo” sed en la ĵurnalo Ouest-France de la 5^a de oktobro 2020 (en rubriko “Maro”) ĉiufoje, en la titolo kaj en la artikolo mem, la ĵurnalisto erare skribis “Unu Mondo” anstataŭ “Mondo” kvankam klarigante ke temas pri Esperanto vorto.... Sed la ĉefa afero estas, ke oni elektis Esperanto-vorton. . . .

La 5 partoprenantoj al tiu ekspedicio estis en Lorient kadre de la Festivalo pri maraj aventuristoj de merkredo 7a ĝis lundo 12a de oktobro. Mi demandis al la klubo de Hennebont kaj Lorient ĉu iuj povus viziti ilin. Claude kaj Loes Bensimon sukcesis kaj jen la raporto de Claude:

“Pasintan dimanĉon, Loes kaj mi vizitis la festivalon pri maraj aventuristoj en Lorient, kaj renkontis Tobias, la kunulon de Sophie (Sofi), la iniciatintoj de la ekspedicio “Unu mondo”. Mi demandis al li la kialon de tiu Esperanta nomo de ilia ekspedicio.

Li diris al mi unue, ke li jam havis antaŭe velŝipon nomitan de li “Unu mondo”. Ŝajnas ke li vendis ĝin.

Li elektis tiun nomon, sen paroli Esperanton (nek lia kunulino Sophie) ĉar ili konsideras, ke ni vivas en unu nura mondo, kies partoj estas ligitaj per la oceanoj. Pro tio ili nomis la ekspedicion Nova Mondo. Ili volas atentigi la publikon pri la unueco de la mondo, kaj pri la vundebleco de la tuta natura medio, kie ajn oni poluas ĝin.

Ili ŝatus lerni Esperanton, li diris, kaj li pensas ke Sophie ŝatus kaj povus facile lerni ĝin. Mankas la tempo. Mi diris ke se ili iam venus en Lorient por kelka tempo, mi povus inici ilin iomete pri esperanto.



Ili vendas botelojn da vino, kun etikedo desegnita de amiko.

La desegno sur la etikedo montras ilian ŝipon kun la nomo “Unu mondo”. Ni aĉetis unu botelon, la vino estis sufiĉe bongusta.



Ni interŝangis adresojn kaj telefon-numerojn.

Jen kelkaj fotoj de la ŝipo kaj de la renkonto. Gratulon al Claude kaj Loes!

Josette



SHAMHAIN



Se frosto malinstigas vin al eksteraj promenadoj,
se la longaj noktoj forpuŝas vin el via ĝardeno,
se la raportado pri la pandemio devojigas vin de radio kaj televido,
tiam malfermu la komputilon kaj vizitu la videoludon de Alice kaj Steven!

Certe, vi renkontos araneojn, gulojn kaj aliajn agrablaĵojn. . .sed nur virtuele. . .kaj en Esperanto!

Kaj vi povos kontribui al la plibonigo de la esperant-lingva traduko, per sendo de viaj proponoj en la rubriko "tradukoj"

Por ludi estas tre facile!

1. malfermu vian serĉilon kaj skribu: "Samhain Kongregate" aŭ rekte skribu: "www.kongregate.com/games/JeuxBebel/samhain" en la adresbreto.
2. atendu kelkajn sekundojn
3. venos reklamo
4. poste aperos "loading"-atendu kelkajn sekundojn!
5. en la menuo elektu "Opcioj".
6. Klaku sur la verdan stelon
7. klaku sur "x" (supre dekstre) por reveni al la menuo
8. elektu "nova periplo" aŭ "daŭrigu" (se vi jam komencis ludon)
9. Ĝuu ... kaj konigu la ludon al esperantistaj konatuloj, precipe al ŝatantoj de videoludoj!

12a de decembro 2021: Zamenhoffesto en Esch-sur Alzette (Luksemburgio)



En 2020, la tradicia Zamenhof-festo ne povis okazi en Luksemburgio !

Ĉi-jare, 15 plenkreskaj samideanoj el Luksemburgio, Belgio kaj Loreno respondis al la invito de Brian Moon, kiu vizitigis matene la 2an pli grandan urbon de la landeto, pasinte tre gravan ŝtal-produktejon.


La esperantista etoso ŝajne plaĉi al nia juna akompananto. Ĉu tiu-ci poste sekvos la vojon indikitan de siaj gepatroj ?

La viziton sekvis bone provizita manĝado en restoracio Carpini , prezento de novaj libroj alvenintaj en la libroservo de E.F.E kaj prelego pri literaturaĵoj far Istvan Ertl, okaze de la tago de la Esperanta libro.

Malgraŭ malgaja vetero en pandemia etoso, jen bela parenteza tago, kiu esperigis baldaŭan revigligon de nia movado !

J-L.Thibias !

Radio-Caraibes-Nancy invitas Esperanton.



La “klačno Chamalo”, profesie instruisto, ne nur krome ĝojigas la infanojn en diversaj okazoj sed ankaŭ multe aktivas en la medio de lokaj radioj, kie li ŝatas prezenti la diversajn asociojn kaj doni al ties membroj la eblecon konigi sian aktivadon.

Jam plurfoje Chamalo malfermis la ondojn al Esperanto Nancy 54.

Ĉi-aŭtune, li proponis al diversaj asocioj reprezenti sian fakon post dormmeta agado dum la kovima periodo.

Dum pli ol duonhoru, Liliane kaj mi aŭdigis pri Esperanto en elsendo eldonita la 22an de septembro.

Chamalo proponis, ke dum la tuta jaro, ni gvidu dek-minutan kurson, okaze de la duon-monata elsendo “vie associative”.

Do jam dufoje, Adeline provis instrui Esperanton al Mateo!

La elsendaĵoj estas registritaj ĉe radio RCN 90,7 FM en ĝia retejo: rcn-radio.org:

Rubrikoj Emissions/Pod Cast – Vie associative – Emissions du 3-11-21 et du 15-12-21,

Kompreneble, ĉiu reaŭdo de la elsendoj montras intereson de la publiko al Esperanto. Do ne hezitu iri al la RCN-retejo!

Dum la tutlanda “Telethon” de la 5an de decembro 2021, Chamalo klačne animas lokan aranĝon.

La “teletono” celas helpi malsanajn infanojn.



Jean-Luc Thibias

Donacu al vi bonan Esperanto-kurson en aprilo 2022 en Grezijono

PRINTEMPaS: intensivaj kursoj kun Przemek, Szabolcs, Christophe aŭ Marion. Eblo ekzameniĝi de la 22a ĝis la 30a de aprilo 2022. Vidu rete: gresillon.org/p

Aliĝu jam nun por profiti reduktitan prezon por fru-aligantoj. Se la kursaro ne rajtas okazi aŭ se vi ne rajtas veni pro la san-situacio, ni repagos ĉian antaŭpagon.

Se vi antaŭ-pagas per franca banka aŭ feria ĉeko, ni ne enkasigos tiun ĉekon ĝis certas la san-situacio.

Ĝojajn Jarfinajn Festojn kaj Sanan Novan Jaron deziras la Esperanto-Kulturdomo en kastelo Grezijono, Francio

Maison Culturelle de l'Espéranto

Grésillon – Saint Martin d'Arcé– 49150 Baugé en Anjou – France



Feliĉan novan jaron!



PARIZO feste ornamita en decembro 2021



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

Nia foto-paĝo

**Ekzotika ĝardeno en
Slovakio, kaktoj**



**Kristnasko-ornamaĵoj en Alzaco, en vilaĝo,
ĉe Kristnasko-bazaroj..**

